



Informoj:
Arto :- Literaturo
Turismo :- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakcio:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

KURIOZAJOJ

NEGRAJ LINGVOJ KAJ ESPERANTO

Neniu certe miras, kiam li scias, ke nia bela parolilo, laŭ multaj rilatoj, similas al la ĉefaj eŭropaj lingvoj, el kiuj nia kara majstro, Zamenhof, konstruis ĝin; tio estas natura sekvo, natura fakto, kaj tiel okazas ekzemple pri la nura artikolo «la» rilate al la koncerna angla «the» same, kiel pri la seksmanko ĉe la vortoj signifantaj aĵojn aŭ aferojn en ambaŭ lingvoj, pri la vorta kunmetado, al kiu tiel inklinaj estas la germanoj, pri la preskaŭ tuta egaleco de multego da vortoj esperantaj al la hispanaj, francaj, italaj, ktp; sed certe multaj legantoj ne suspektas, ke ankaŭ ekzistas similecoj inter nia lingvo kaj tiuj negraj parolataj en Afriko, neatendata simileco, kiu estas la temo de ĉi tiu artikoleto.

En la tri ĉefaj grupoj de lingvoj parolataj en Afriko: nome: Boskimanaj, Sudanaj kaj Bantus'aj same, kiel ĉe ni okazas, la vortoj estas tute sen-seksaj kaj, kiam oni parolas pri besto, kies sekson ni deziras nepre rimarkigi, estas necese aldoni specialan vorton signifantan viro aŭ ino; ekzemple, «chinanu = bovo, china yo = bovino»; foje eĉ oni nomas per tute diferenca maniero ambaŭ seksulojn. Ofte tamen, la vortoj finiĝas per sufikso montranta, ne ĝuste la sekson, sed la plimalpli grandan gravecon de la signifata afero, kio ja estas pli utila kaj logika distingo, ol la sensenca, seksa diferencado de ĉiuj vortoj ekzistantaj en nia nacia lingvo same, kiel en multaj aliaj.

En la bantusaj lingvoj, kiuj estas la plej multa parolataj en la meza kaj suda parto de Afriko, la substantivoj estas klasigitaj laŭ kelkaj specoj (de 10 ĝis 20) simile, kiel ni faras en Esperanto per niaj sufiksoj «ul, ec, ad, uj», ktp; ekzemple: «Omu-ganda» = homo apartenanta al tiu gento; «Bu-ganda» = sia teritorio; «Iu-ganda» = sia lingvo; sed per tiu diferenco, ke ili uzas prefikson anstataŭ sufiksoj kaj akordigas kun la koncerna substantivo ĉiujn vortojn al ĝi rilatantajn; nome: ĉiuspecan adjektivojn, verbojn, kc. La genitivo estas farata, kiel en Esperanto, metante unue la posedaton kaj poste la posedanton, sed la preposicio

«de» estas anstataŭata per la litero «a» aldonata al la karakteriza vokalo de la klasprefikso, al kiu ĝi apartenas.

Ankaŭ en ĉi tiuj lingvoj ekzistas sufiksoj, aldoneblaj nur al la verboj, samsignifaj kiel, «ig, em, ad, ebl» kaj aliaj kun egala senco, kiel niaj prefiksoj «Ek» kaj «mal»; ekzemploj: «Fa» = morti; «Fisa» = mortigi («a» estas la verba finaĵo); «Hamba» = iri; «Hambisa» = irigi; «Vuji-ka» = rompebla; «One-ka» = videbla; «Junga» = ligi; «Jung-u-a» = malligi.

Fine, en ĉi tiuj lingvoj, en kiuj malabundas la adjektivoj, ofte oni derivas tiajn vortojn el substantivoj per aldonado je sufikso, kiel ni faras multajn fojojn en Esperanto.

Ĉe la boskimanaj, kiuj loĝas apud kaj en dezerto kalahari, ekzistas iu pronomo signifanta «li» aŭ «ŝi» kaj alia egalsenca, kiel «ĝi»; ili do, kiel la esperantistoj, diferencigas la ulojn de la aĵojn.

Malgraŭ tiuj similaĵoj ankaŭ havas ĉi tiuj lingvoj kuriozajn strangajojn por la eŭropanoj, kiel okazas ekzemple ĉe la boskimanaj, kiuj eligas krom la literojn aliajn similaĵojn jen al la sono, kiun ni aŭdigas per la lango, kiam deziras vigligi irantan ĉevalon, jen la palata langoklakso, jen al domaĝa buŝsono aŭ jen fine al kisbruo.

Ĉi tiuj lingvoj kaj la sudanaj estas unisilabaj; sed, tial ke la nombro da silaboj ne estas sufiĉa por esprimi ĉiujn pensojn, malgraŭ tio ke ili ne estas multaj, oni rimedas tion same, kiel faras la ĥinoj, prononcante la saman silabon per diferencaj tonoj kaj tiel konsistigante malsamajn vortojn; ekzemple: «Do» (per basa tono) = diri; «Do» (natura tono) = dormi; «Do» (alta tono) = esti malgaja.

La pluraloj ĉi tiuj popoloj montras per ripeto de la koncerna vorto; ekzemple: «Nyam-nyam» = homomanĝantoj (kanibaloj).

Oni vidas do per la antaŭa similecoj, ke eĉ por la negroj de Afriko Esperanto rezultas facila lingvo kaj ni rajtas sekve diri, ke ĝi estas ja internacia, neutrala kaj tutmonda, ĉar ĝi alprenis eĉ nevole la logikaĵojn el ĉiuj lingvoj de nia planedo, kvankam ili estas parolataj de niaj nigraj fratoj.

RAMÓN DE SALAS.

HO, MAJSTRO

Ho, majstro de la mondo
El kie vi eltiris la malamon,
Per l'Esperanta fondo!
Aŭskultu vi l'aklamon.
De l'homoj trumpetantaj vian famon.

Vi nun estas nur luno
Ĉe la malluma nokto de l'homaro,
Sed baldaŭ estos suno,
Disfalos ĉiu baro
Kaj ne plu nin blindigos la eraro.

En ĉiu tera lando
De unu el polusoj ĝis l'alia
Pro ama propagando
Parolo sankta via
Trasonos kun dolĉeco harmonia.

Jen ĝi al ni promesas
De l'homrilatoj streĉi la ligilojn:
Admoni ĝi ne ĉesas
Donante bonkonsilojn
Al ni por feliĉigi niajn filojn.

Ni ĉiuj por laboro
Klopodas imitante plej l'abelon;
Jam en proksima horo
Atingos ni la celon
Kaj la homar' profitos la mielon.

Nur tiam, homsavinto
Ripozos vi post longa laborado
Vidante el la pinto
De via glor restado
Kiel jam venis pac-regado.

Kaj kiam jam vin kveros
La morto estos granda la doloro,
Sed vi ne malaperos,
Ĉar restos rememoro
Dum batos en la mondo homa koro.

Originale verkita en 1908a de

J. MORATÓ.

GIARDINI KAJ ZAMENHOF

Jen, fama violinisto kaj kuracisto.

«La konstanta laboro—diris ili—kaj ne perdi la tempon sed uzi ĝin kun persisteco; ili markis al ni la vojon».

La triumfo alvenas per senĉesa laboro kaj ili ne estas frukto de unu tago. La plej facila aĵo, bezonas multe da atento, amo kaj tempo kaj, kiam ĝi estas utile por ĉiuj, sen kunlaborado ne alvenas la triumfo.

Al Giardini oni demandis iafoje en kiom da tempo oni povus lerni ludi la violonon kaj Giardini respondis: «Post dudek jaroj da laboro dekduhora ĉiutage».

Rimarkinda kuraĝo de individueco por alveni

al la triumfo kaj laborado, por ne malŝpari tiun kuraĝon. Laŭdindaĵo.

La ekzemplon de Giardini, ni povas kompari kun nia neforgesebla Zamenhof, kiu sukcesis per sia persona kuraĝo multejara doni al ni internacian plenan gramatikon, eksterordinare facilan por ke ni kun ĉiuj komuniku.

Ĉu ni lasos perdi tiun laboron, kiun kun tiom da amo al la Homaro efektivigis Doktoro Zamenhof?—Ni diras: Ne.

En tuta la mondo kunlaboradas homoj por disvastigi tiun ĉi grandan idealon kun nepriskribebla entuziasmo.

En Hispanujo estas kolosa la movado kaj espereble tre multe progresos dank' al la interligo de ĉiuj esperantaj hispanaj kluboj.

La Societo Frateco, kiu dum spaco de multaj jaroj laboras en Aragono, inter multaj trafikaj iniciatoj, klarigas lekciojn aŭ kursojn per korespondado por aragonaj naciaj geinstruistoj.

Tiamaniere esperantiĝis per la helpo kaj direkto de mia karega amiko kaj profesoro S-ro Orós, entuziasma, kiel la plej el ĉiuj samideanoj de nia duobla lingvo Esperanto, kaj inda je la loko, kian li okupas de Prezidanto de H. E. K.

Devas labori ĉiuj, ĉar ekzistas laboro por ĉiuj kaj tion postulas la vera demokratio principo de paco kaj kulturo, kaj nenio estas taŭga ol Esperanto por eviti pereigajn interspacojn.

Nia Vivo efektivigos la miraklon en Hispanujo kun la klubo nomata «Rondo Frateco». Tre bone, S-ro Inglada. Helpemo, helpemo! laŭ Etayo.

Ne forgesas ni Giardini kaj Zamenhof, kaj ni sekvu iliajn signojn, farante la bonon, eĉ ne esperante rekompenco.

Esperanto estos la magia violono, kiu interligos nin ĉiujn kaj malaperigos la nekomprenon kaj la malamon inter la homoj de la tuta mondo.

Vivu Esperanto!!

J. PÉREZ CAÑETE.

Ateca kaj februaro 1.932.

AMO

Kiel bela estas la amo; ĉu ne? Sed kia amo estas la plej bela kaj vera?

Ĉu la amo al nia patrujo?, ĉu la fianĉa amo?

Estas multaj diversaj amoj, sed mi opinias, ke estas la plej vera, la plej bela, la patrina amo.

Kiel bela, kiel belega estas la patrina koro! Kiam mi estis okjara loĝis en la tria etaĝo de mia domo sinjorino, kiu multe amis min; tiu sinjorino ĉiam estis plorante pro la morto de sia edzo kaj pro la foriro de sia filo, ĉar ŝi havis filon; malbona viro, ĉar malbona viro estas, kiu forgesas sian patrinon.

Tiu filo, kiam estis 20 jara, kiam povis gajni

monon per helpi sian patrino foriris tra nekonnata vojo.

La malfeliĉa patrino ploregis, sed ŝi ne ploris ĉar je ŝia maljuneco devis perlabori, ne; ŝi jam havis kutimon laboregi, ĉar la edzo mortis, kiam la filo estis okmonata kaj ŝi sola gajnis la monon por, ke la filo kresku kaj estu viro.

La filo ĉiam estis la spegulo, kien la bona patrino rigardis sin. Antaŭ dek jaroj ŝi ne vidis sian filon sed ŝi ĉiam diris al mi: «mia koro diras, ke mia filo baldaŭ revenos».

Ian tagon, mi estis ludante antaŭ la pordo de mia domo kaj juna viro, kovritaj, per ĉifonvestaĵoj, ŝia malgrasaj karnoj, diris al mi:

—Infanino, ĉu vi scias, ĉu tie ĉi loĝas sinjorino Ludovikino?

Mi rigardis lin de la piedoj ĝis la kapharoj kaj demandis anstataŭ respondi:

—Ĉu ĝi estas sinjorino, kiu ne vidas antaŭ dek jaroj sian filon?

—Jes, mi portas sciaĵojn pri li.

—Do, sekvu min, mi vin akompanos, ŝi loĝas en la tria etaĝo kaj ĉiam donas al mi sukeraĵojn. Ĉu la filo de tiu sinjorino jam estas alta viro?

Tiam jam mi estis babilema, mi supreniris la ŝtuparon saltante po kvar ŝtupoj ĉiufoje kaj kriante:

—Sinjorino Ludovikino, sinjorino!, tiu sinjoro volas paroli al vi pri via filo!

Kiam mi estis sur la tria etaĝo kaj sinjorino Ludovikino malfermis la pordon mi nur aŭdis ĉi tiujn vortojn:

—Mia filo!

—Patrino!

Kaj la filo genuiĝinte sur la planko ekdiris:

—Patrino, mi ne meritas vian pardonon, jam mi scias, sed vi estas tre bona, pardonu min!

—Malfeliĉa mia filol, kial mi ne pardonu vin?

Multe mi suferis dum via malesto sed estas ĉio pagita pro la ĝojo, kiun vi donas al mi hodiaŭ, vi ne estas tute malbona, vi memoris ankoraŭ vian patrino. Sed, kiel malsana vi estas, kiel malgaja estas via vizaĝo!

Eniru en via hejmo, mi flegos vin kaj se estas necese, denove mi laboros kaj zorgos pri via dormo same, kiel mi faris, kiam vi estis bela bubeto...

Kiu viro aŭ virino ricevus tiamaniere sian amanton post dekjara foresto?

Originale esperantverkita.

PILAR SALVO GONZÁLEZ.

S-ro Alfonso Sabadell mortis la pasintan januaron en Italujo: li estis malnova kaj entuziasma pioniro; en la jaro 1901 li estis la unua, kiu laboris por Esperanto en Barcelono; li faris interesajn tradukojn; de la jaro 1905 estis nomata «Lingva Komitatano».

Ripozu pace S-ro Alfonso Sabadell.

* * *

La esperanta lingvo povas taŭgi por la interrilatoj de la diverslingvaj homoj, kaj sekve por, ke ili interkomprenigu unu la alian; per la interkompreno venas la amo kaj per la amo la paco.

Ofte, oni alnomas preskaŭ kiel duonfrenezaj tiujn, kiuj per interŝanĝo de poŝtkartoj, poŝtmarkoj aŭ aliaj objektoj korespondas esperante kun fremduloj; ili per tiaj korespondadoj helpas multe la interkomprenon de la homoj; la laboro farita de unu el tiuj korespondantoj ne estas grava, sed multaj el ili plenuminte la saman taskon, povas multe fari.

Ili devas nepre respondi al ĉiuj, kiuj al ili skribos, komplezi ilin laŭeble kaj ĉiam en siaj respondoj esti afablaj, sinceraj kaj ĝentilaj; plenumante tiajn kondiĉojn, ili laboras por la vera unuigo de la homoj.

P. BESCÓS.

Huesca.

◀ SCIIGOJ ▶

Ni rememorigas al ĉiuj, ke nia Societo havas esperantajn gramatikojn, vortarojn kaj verdajn stelojn.

Ni ricevis de s-ro Jaime Grau «Novaj amaj poemoj» kaj la duan eldonon de Kataluna Antologio; ili estas tre bone verkita kaj tre interesaj; la Antologio meritis esti rekompencita de la Esperanta Akademio. Ni dankas al S-ro Grau por lia sendaĵo.

Vojaĝo al Parizo.—La Orienta Esperantista Federacio, voĉdonis la Komitaton por la aranĝo de la karavano por ĉeesti la proksiman universalan Kongreson de Esperanto okazontan en Parizo.

Tiu Komitato konsistas el S-roj Marzal, Piñó kaj Máñez, prezidanto; sekretario kaj kasisto respektive.

La Komitato jam komencis labori: Ĝi faras klopodojn por atingi rabaton en la fervojoj.

Ĉiu kiu deziras informojn pri tiu, devos sin turni al la Sekretario S-ro Andrés Piñó Alegret, Str. Colón, 24, Valencia.

Nova esperanta gazeto.—Ni ricevis la unuan numeron de «Verda Stelo» esperantista gazeto eldonata en Barcelono, Str. Montaña, 94, 1.^a

Sur ĝi estas uzataj Esperanta, Kataluna kaj Hispana lingvoj. Ni kore salutas la novan kamaradon al kiu ni deziras plenan sukceson.

La Urbo de la Paco.—En la sidejo de la grupo «Barcelona Esperantista» okazis grava kunsido, kie oni nomis Komitaton konsistantan el reprezentantoj de ĉiuj, esperantistaj grupoj de Barcelono, por studi kaj helpi la projekton de S-ro Henri Oger pri la starigo en Barcelono de la Paca Urbo. Ni tre deziras, ke tiu idealo estu atingata.

Paco kaj Amo.—Tiu esperanta grupo de Barcelono ĵus eniris en la Katalunan Esperantistan Federacion. Plaĉas al ni tiun gravan aliĝon kiu kreskigas Hispanan Esp. Konf.

Nova Sento barcelona esperanta grupo, starigis en sia nova ejo: Srt. Llull, 210, Barcelono. Ni korespondas al ĝia saluto.

AMUZAJO

SOLVO

- 1.^a—K **A** lo
- 2.^a—K **E** lo
- 3.^a—K **I** lo
- 4.^a—K **O** lo
- 5.^a—K **U** lo

MAYNAR.

SPRITAJOJ

Mi estante en societo montris antikvan fotografajon, kiu prezentas mian patron kun liaj sep gefiloj. Mi sidas sur la patraj genuoj. Unu el ĉeestantoj demandis:

—Kiu estas tiu ventroparolisto?

—Mi ĵus lavis miajn manojn. Donu al mi sekigilon.

—Mi ne havas. Elirigu ilin for de la balkono kaj la aero sekigos ilin.

—Bone, sed pripensu ke morgaŭ mi banos min.

Kampano rajdis sur azeno apud la vosto de la besto.

Najbaro renkontis lin, kaj diris: —Nul, kial vi rajdas tiel malantaŭe?

—Ĉar tiamaniere mi vidas pli da azeno antaŭ mi.

En la poŝtofiĉejo.

—Ĉi tiu letero pezas multe; necesas aldoni unu poŝtmarkon.

—Sed sinjoro, se oni aldonas poŝtmarkon ĝi pezos pli.

LA SEVILJA DELOGISTO KAJ STORA ĜASTO

AKTO UNUA.—SCENO UNUA

Saloneto en la palaco de la Neapola reĝo. Nokte. Estas mallume. Don Juan, kun vizaĝo kaŝita per mantelo, Isabelo.

Isabelo. Duk' Oktavo, tien ĉi
Kaj vi sen danĝer' eliros.

Don Juan. Plenumi mian amvorton
Mi ree ĵuras, dukino.

Isabelo. Mia feliĉ' estos vero,
Promesoj kaj korinvitoj,
Regalado kaj sindono,
Bonvolo kaj amikiĝo.

Don Juan. Jes, mia kara.

Isabelo. Mi volas
Alporti lampon.

Don Juan. Por kio?

Isabelo. Por ke l'okuloj atestu
Mian ĝuatan feliĉon.

Don Juan. Se vi ĝin alportos, tuje
Mi la lumon blovestingos.

Isabelo. Ho, ĉiel, kiu vi estas?

Don Juan. Kiu mi estas? Nur viro
Sen nomo.

Isabelo. Ĉu ne la duko?

Don Juan. Tute ne.

Isabelo. Helpon! Ho, Dio!

Don Juan. Haltu, manon al mi donu.

Isabelo. Ne, malnobla kavaliro,
Ne haltigu min. Al reĝo!
Venu soldatoj, gardistoj!

SCENO II

La samaj.—La Neapola Reĝo, kun kandelo en kandelingo.

La Reĝo. Kio estas?

Isabelo (flanken). Ve, la Reĝo!

Don Juan. Kio? Tre simple: nur viro
Kaj virin' estas.

La Reĝo (flanken). (Singardo
Ĉi tie taŭgas)

(*La Reĝo penas ne vidi la dukinon.*)

Gardistoj!

Ĉi tiun homon arestu!

Isabelo (kovrante sian vizaĝon).

Ve, al mi, senhonorigo!

SCENO III

Don Pedro Tenorjo, gasdistoj, la Reĝo, don Juan, Isabelo.

D. Pedro. En via ĉambr', altsinjoro,
Voĉoj! Pro kia motivo?

La Reĝo. Al vi, don Pedro Tenorjo
Mi donas la komision
Aresti lin: agu lerte,
Venante baldaŭ al fino.
Vidu, kiuj ili estas,
Kaj plej sekrete pri ĉio.
Antaŭvidas mi malbonon,
Kaj se mi mem vidas tion
Ĉi tie, jam pli skandala
Mi trovos en mond'nenion (*Li foriras*).

(*Daŭrigota.*)

El la hispana lingvo tradukis
V. INGLADA.